

## Kasoj kaj Fondajhoj de ILEI

### Afrika Kaso

*Starigo-jaro:* Trovenda. En la lastaj jaroj.

*Stariga instanco:* Trovenda – ni supozas ke la Komitato.

*Celo:* Apogi la agadon de ILEI en Afriko. Temas pri okazigo de trejnseminarioj, edukaj aranghoj kaj la evoluigo de rilatoj kun afrikaj lernejoj kaj universitatoj. Ekzemploj de uzo estas la seminario en Kinshaso en julio 2009. La kaso ne havas apartan regularon; ghin administras la estraro de ILEI.

### Koleghelpa Kaso

*Starigo-jaro:* Trovenda. Antaŭ tre longa tempo.

*Stariga instanco:* La Komitato de ILEI

*Celo:* Ebligi ILEI-membrecon al kolegoj el la plej nepagipovaj landoj. Ghi estas esenca helpilo en la agado starigi sekciojn en novaj landoj. Ghi havas propran regularon; petoj por membrigho – de unuopuloj au sekcioj – devos atingi la sekretarion ghis januaro 15. La estraro ghis februaro 15 decidus kiujn subteni, lau la disponeblaj rimedoj. Se tiuj rimedoj kreskas pliposte, eblas membrigi pli da dezirantoj.

### Fondajho Szerdahelyi

*Starigo-jaro:* Trovenda. Anonco pri ghi troveblas en 1991, do fondita nelonge antau tio.

*Stariga instanco:* La Komitato de ILEI.

*Honorato:* La eminenta hungara pedagogo kaj verkisto, fondinto de la Esperanto-katedro en la universitato ELTE en Budapeshto, prezidanto de ILEI de 1985 ghis 1987.

*Celoj:* Permesi al ILEI entrepreni pli ambiciajn projektojn pri i.a. eldonado, pedagogia terminologio, instruista trejnado, esplorado pri lingvo-didaktiko kaj okazigo de kursoj kaj ekzamenoj. Ne estas indikoj pri propra regularo. Administras la estraro de ILEI. Ghi ne havas juran bazon, kaj ne estas administrate kiel vera fondajho kun kapitalo kaj rento.

### Fondajho Erika Linz

*Starigo-jaro:* Trovenda. El la okdekaj jaroj, kiam s-ro Ole Olssen estis nia kasisto.

*Stariga instanco:* La Komitato de ILEI.

Starigita lau heredajho de Erika Linz el Austrio. Ghi tamen ne estas jure registrita fondajho sed lau la deziroj de la donacinto, ILEI traktas ghin tiumaniere. Ghi havas fiksitajn netusheblajn sumojn, kies interezo farighas chiu jare je dispono. La fondajho ne akceptas donacojn kiel la aliaj kasoj, sed ghi montras ekzemplodonan manieron provizi al la ligo longdaŭran financan stabilecon.

### Kaso Dazzini

*Starigo-jaro:* Trovenda. En la naŭdekaj jaroj.

*Stariga instanco:* La Komitato de ILEI.

*Honoratoj:* Memore al gefratoj Mario kaj Catina Dazzini, pioniroj de ILEI en Italio kaj mondscale.

**Celoj:** Por ebligi partoprenon de nepagipovaj kolegoj en niaj konferencoj. Ekzemple en la nuna jaro ghi ebligos al kelkaj kubaj kolegoj partopreni en la konferenco.

### **Kaso Interkulturo**

Informoj arigataj. Por stimuli la siatempajn interkulturajn projektojn de ILEI kaj pli vaste la nuntempan interkulturan agadon.

### **Flugiloj al Facila Vento**

Informoj arigataj. Por stimuli la retan kaj alispecan instruagadon, precipe inter junuloj.

=====

Viaj donacoj al chi tiuj kasoj kaj fondajhoj estas tre bonvenaj, ech esencaj, por la laboro de la ligo. Pri donacoj, bonvolu kontakti la ILEI-kasiston, Julija Batrakova, ĉe <persiko@mail.ru>. Pagojn vi povas sendi al la UEA-konto ilek-a, au al la banko-konto de ILEI ĉe: ING Bank N.V., numero: 4676855; IBAN: NL55INGB0004676855; BIC: INGBNL2A.

Koran antaudankon!